La proposition de M. Bourquin est déjà une idée qui fait son petit bonhomme de chemin parmi les euro-parlementaires.

Germain Pirlot, Oostende - Belgique

KAFE

La unua okazigo de la "Kultura Arta Festivalo de Esperanto" en Tuluzo, de la 5a ĝis la 9a de Julio, estis sukcesa : 250 personoj, inkluzive la artistojn kaj organizantojn, 21 spektakloj, 5 atelieroj (la koruso ekzemple provkantis ĉiutage 5 horojn), literaturaj forumoj -dum unu el ili Dro Albault ricevis simbole la libron "De A al B"-, artistaj forumoj, ekskursoj, libroservo, interreta servo, manĝ- kaj trinkbudoj, ktp... KAFE dancigis, kantigis kaj umigis multajn gejunulojn dum longaj postspektaklaj horoj, foje ĝis mateniĝo... Raportis (vidu dekstre) unu el la partoprenintoj, Colette Carbonnel :



La premiero de KAFE estis sukceso. Dum 5 tagoj, en tre agrabla loko kaj simpatia etoso, eblis al ni retrovi geamikojn, trovi novajn geamikojn kaj kun ili ĉeesti la diversajn spektaklojn, kiuj okazis dumtage sub la arboj de la parko de Mounède kaj nokte en la spektaklosalono de la kasteleto. Inter la artistoj ŝomart kaj Nataŝa, ankaŭ Solen speciale kortuŝis nin. Ĵak le Puil, Jacques Yvart, Emily Barlaston akiris sukceson kiel kutime. Kajto, muzikistoj kaj kantistoj el Nederlando, surprizis nin per sia originaleco. Sub la gvidado de de la korusestrino Zdravka Bojčeva el Bulgario, duideko da personoj preparis koncerteton, kiun ni ĝuis la lastan vesperon. Ni ne forgesu la plenaerajn demonstronjn, inicado al folkloraj dancoj, spektaklon de mimoj, ekspozicion de pentraĵoj, ktp... Ni gratulas la organizantojn, speciale Floreal Martorell, kaj esperas duan eldonon de KAFE.

SPERTOJ EN GREZILJONO**KAJ**


Jam de longe mi ne vizitis Grésillon. Ĉi-jare la kulturdomo anoncis sian renoviĝon kaj samtempe la permeson de la ŝtataj instancoj malfermi nur la unuan etaĝon por akcepti la esperantistojn. Ne timu : la kastelo ĉiam staras, kun doma ĉirkaŭaĵo bele florumita de la ĝardenisto, meze de la bela arbaro. Nur interne ni rimarkas apenaŭ novajn fajrodeteno-pordojn. La salono kaj la biblioteko estas elegante tute renovigitaj, kiel de la domo la elektra parto, kiu kostis fortuneton. La aliaj novaj individuaj ĉambroj aperis ; oficejo, klasoj ne ŝanĝiĝis. Nur restas problemoj kun la dua etaĝo kaj la kuirejo, kies gazan kuirforonon ili ne rajtas uzi laŭ la novaj ŝtataj normoj ; ili sin turnas al iu pladvendisto por la ĉefa kuirita plado. Kompreneble la asocio ĉiam bezonas monon por pli daŭrigi la laborojn (metu la manon al via momujo !). "Kulturaj Kajeroj" ne reaperis ĝis nun. Bedaŭrinde ne multaj personoj partoprenis la staĝon, kiun mi partoprenis. Dum tiu periodo, la dua, ni estis nur 19. Du kursoj kaj inicado al teatro okazis. Esperu ni, ke la aŭgustaj staĝoj akceptis pli da personoj. La etoso inter la partoprenantoj estis tre agrabla. Bedaŭrinde ni ne povas same diri pri la medio de la organizantoj. Kial publike disputi ? Ĉu Greziljono ne konvaleskas ? Ĉu konkurenco ne ekzistas ? Ĉu "la Furio" ne povus tranvile inter ŝanĝi pli mildajn parolojn kun siaj alparolintoj ? Kial ni ne ricevis la liston de la partoprenantoj ? Ne tio donas bonan bildon de la domo. Se tia etoso regas, eble la esperantistoj timos reveni. Feliĉe la kasisto kaj la kuirstinoj donis pli bonan impreson kaj afablecon kaj ĝentilecon. Post tio, interkrampe dirita, kion mi skribas, kritikis, mi pensas, ke Greziljono meritas pli ol furiozaĉon, ĉar ĝi estas monumento en la movado, kaj mi tamen bondeziras al la kastelo longan vivon kaj sukceson.

JIPE

LA KVINPETALO

Inter la 1a kaj la 5a de septembro okazis astronomia staĝo ĉe la vinpetalo (Bouresse) ; Ĝin gvidis Patrick Lagrange, direktoro de la Astronomia Observatorio de Ĉrana Monto en la francaj Alpoj. Aktive partoprenis la kurson astrofizikistoj israela Dro Alex Mikishev kaj franca Sro Jacques Joguin (notu, ke Dro Mikishev preĝis la 31an de aŭgusto dum la 26a Internacia Semajno en Sète), ankaŭ amatoraj astronomoj el Germanio, Nederlando kaj Francio (niaj samregionanoj : Witold Cayzac, Hanna Szczyrbula-Cayzac kaj Robert Sarrut). Kursgvidanto Patrick Lagrange prezentis prelegojn pri nia sunsistemo, pri nia galaksio kaj la Universo. Krome ne mankis praktika ĉelobservado (Luno, disverstipaj steloj, galaksioj, nebulozoj, planedoj Jupitero kaj Saturno). Dumtage ni povis observi la Sunon (tra filtro kompreneble) kaj laŭ artifice produktita eklipso ! Inter la sciencaj sesioj okazis kunsido de Astronomia Esperanto Klubo (aktuale ĉirkaŭ 60 membroj el 22 landoj !), kiu okaze de Universala Kongreso en Tel-Avivo eldonis Astronomian Almanakon 2000 (vi povas mendi ĝin ĉe Samideanino Hanna Cayzac / cayzachanna@netcourrier.com / Tel : 0467595574 por la prezo de 8 Eŭroj).

Hanna Szczyrbula-Cayzac



TEJO-KONGRESO EN HONGKONGO (5-12 VIII)

9

"Partoprenis ĉirkaŭ 200 kongresanoj el 24 landoj de ĉiuj kontinentoj (160 Azianoj kaj nur 30 Eŭropanoj). La organizado funkciis tute glate, la programo estis sufiĉe abunda kaj interesa. Tiu IJK vastigis ĉies horizontojn. Post la IJK tiu-ĉi mondo ŝajnas al mi multe pli granda ol antaŭe". (laŭ raporto de UM)

La 57a IJK (Internacia Junulara Kongreso) okazos en **Strasburgo inter la 29a de julio kaj 5a de aŭgusto 2001**. Jam haveblas aliĝiloj. Ĝis la 3a de januaro, la kotizo estas 203 EUR (loĝado kaj manĝoj) aŭ 104 EUR (memzorgantoj). Pli ol 27jaraĝuloj aldonu 48 EUR, malpli ol 20jaraĝuloj rabatu 48 EUR. Deviga antaŭpago de 50 EUR. Partatempa partopreno ankaŭ eblas (proportia kotizo). La temo de la IJK estos **"Plurlingvismo en Eŭropo: kiel ĝin sukcesigi?"**

Kvankam la oficiala politiko de la Eŭropa Unio estas kompleta egaleco inter la lingvoj de la membroŝtatoj, la integriĝo de la orienteŭropaj landoj defias tiun politikon, kaj praktike kaj ekonomie. Por la neesperantista publiko (Strasburganoj kaj turistoj) samtempe disvolviĝos lingvofestivalo. Por la kongresanoj: ekskursoj, prelegoj, diskutrondoj, ludoj, diskoteko, gufujo...

De Montpellier al Strasburgo estas rektaj trajnoj sed ankaŭ eblas kuniĝi al la biciklista "suda karavano", kiu foriros el Barcelono la 14an de julio kaj estos en Liono la 22an (vidu la apudan mapeton). Por partopreno en tiu IJK eblas ricevi stipendion de la federacio. Informoj ĉe SFS.



Strasburgo estas facile atingebla per ĉiuj vojaĝrimedoj, eĉ bicikle...

85A UNIVERSALA KONGRESO

Sub la temo "Lingvo kaj Kulturo de Paco" la UK okazis ĉi-jare en TEL-AVIVO (Israelo), do unuafoje en mez-orienta lando, ĉar tiu programita en 1967 ne realiĝis pro la tiama loka milito.

La situo de la Kongresejo en tre moderna konstruaĵo, fronte al maro, proksime al la strando kaj bela parko, allogis la 1212 partoprenintojn, kiuj venis el 61 landoj.

Ekde la unua tago "pluvis" la mesaĝoj el gravaj organizoj kiel UNO, Unesko, ktp kaj el eminentuloj por saluti kaj apogi la eventon. Estis rimarkinda la senlaca laboro de la LKK (loka kongresa komitato) malgraŭ ke ili, israelaj samideanoj, ne estis tro multnombraj.

Dum tuta la semajno la kongresistoj havis programaron tre diversan pri temoj kaj laŭ prefero de ĉiu homo: kunvenoj pri lingvistiko, esperanta agado, sciencaj fakoj, artoj, filozofio, sociologio, etnaj problemoj, ktp.

La teatraĵoj kaj muzikaj spektakloj, ankaŭ en la tradicio de la esperantaj kongresoj, estis je alta arta nivelo.

Sed la ekskursoj al nomataj sanktaj lokoj estis la kulmino de tiu neforgesebla kongreso: Nazareto, Jerusalemo, la Morta Maro kaj aliaj historiaj lokoj, krom vizitoj de preĝejoj, sinagogoj kaj moskeoj.

Grandan dankon al ĉiuj israelaj esperantistoj!

Renato Figueira

Ekstraktoj el oficialaj mesaĝoj

Saluto de Sro Josi Saridi, eksministro de kulturo

...La tuta mondo, inkluzive Israelon kaj mezorienton, bezonas treege la lingvon Esperanto kaj la tiom gravan mesaĝon, kiun ĝi disvastigas inter la homoj...

Mesaĝo de la ĝenerala direktoro de Unesko, Sro Koichiro Matsuura

...Esperanto estas lingvo de paco, kreita por forĝi kompreniĝon inter ĉiuj homoj... Unesko vidas lingvon kiel vere la ĉefan rimedon de dialogo, kaj dialogo akcelas interkompreniĝon. Lernado de lingvoj, de lingvoj de aliaj popoloj kaj aliaj kulturoj, estas valora kontribuo al "la laboro por antaŭenigi reciprokkan konon kaj interkomprenon de popoloj"...

Gratuloj al la nova Prezidento de Israelo,

Sro Moshe Katsav (membro de la Honora Komitato)

(NDLR: Sro Shimon Peres, la alia kandidato, estis la Alta Protektanto de la kongreso)

...La kongresanoj bondeziras, ke vi sukcesu realigi vian intencon esti prezidento de ĉiuj israelaj civitanoj, preter diferencoj de gento, religio kaj politikaj opinioj, kaj uzi vian influon por helpi la ŝtaton de Israelo progresi sur la malfacila vojo al paco...

Mesaĝo de Sro Kofi Annan,

ĝenerala sekretario de Unuiĝintaj Nacioj

...Estas nia tasko certigi, ke tutmondiĝo donu avantaĝojn ne nur al iuj sed al ĉiuj; ke paco kaj sekureco realiĝu ne nur por kelkaj sed por multaj; ke eblo ekzistu ne nur por privilegiitoj sed por ĉiu homo ĉie... Memoru, ke ĉiu el ni povas fari ion, por ke nia unueca mondo estu pli bona mondo, kaj ke ĉiu el ni havas la devon eluzi ĉiujn siajn eblojn...

Mesaĝo de Dro L.C. Zaleski-Zamenhof

...Vi venis al la sankta lando de tri grandaj religioj, lando de Dio, "kiun ĉiuj malsame prezentas, sed ĉiuj egale en koro sentas" ... Vi venis por debati la rolon de lingvo neŭtrala, lingvo ne ambicianta anstataŭi iun ajn lingvon nacian, ŝirmon de nacia kulturo, tamen, en ĝia rolo de lingvo internacia, kontribuanta al la kompreno kaj, pere de kompreno, al la toleremo de kulturo de la najbaro, lingvo servanta tiamaniere la ĉefajn faktorojn de la kulturo de paco...

Rezolucio de la Kongreso

La 85a Universala Kongreso de Esperanto...

ALVOKAS ĉiujn internaciajn organizaĵojn, ĉiujn registarojn kaj ĉiujn homojn: ke ili decide ekrespektu la lingvajn homajn rajtojn cele al lingva kaj kultura demokratio en la mondo kaj subtenu la klopodojn de la Esperanto-movado en tiu kampo...



Infankongreseto

Ĝi arigis dudekon da infanoj je trideko da kilometroj de Tel-Aviv . Ne mankis okupoj : manlaboroj, sporto (speciale naĝado), trezor-serĉo, vizito al bestangulo, vespera rakonto, fina koncerto, vizito komputile de la kvazaŭa lernejo Tibor Sekelj, ekskursoj, vespero ĉe plaĝo, ktp. Venontjare ĝi disvolviĝos "inter arboj kaj grimpoj" ene de la urbaj limoj de Zagreb. Loĝado en apartaj kabanoj.

Seminarioj :

La unua okazis en Amano (Jordanio) antaŭkongrese kun la temo : "Tutmondiĝo kaj la Arabaj landoj" . Rezolucio proponas, ke UEA okupiĝu pri disvastigo de E° precipe en landoj, kie ne ekzistas lokaj fortoj, ekzemple en unu aŭ du el la arabaj landoj. Jordanio povus esti unu el ili. Tuj post la UK alia seminario ĉe la Universitato de Tel-Avivo arigis lingvistojn por kompari la socilingvistikajn radikojn de la moderna hebrea lingvo kaj de Esperanto .

Vizito al Israelo : La Muro de Lamentoj**La progreso videbla aŭ kiu estas naiva ?**

Mi vizitis Jerusalemon dum la postkongreso de UFE -karavano. Mergita en tiuj historiaj lokoj, mi sentas min, kiel ne-Judo, fremdulo. Ĉu oni ankoraŭ nun kredas, ke taŭgas la malnova kutimo preĝi kaj peti al Dio, pere de skribitaj tekstoj sur paperetoj metitaj en la fendojn de la Muro de Lamentoj ? Certe, mi scias, ke modernaj iloj kiel ret-mesaĝoj kaj faksoj funkcias per telefondratoj (mi estas teknikisto), kiuj estas metitaj de +/- 0,5m sub la ternivelo ĝis proksimume 4 metroj en la aero aŭ sur la muroj. Eble (?) la saman dubon havis iu Judo, kiun mi vidis preĝanta je la Muro de Lamentoj, la 7an de aŭgusto de la jaro 2000 : li komunikis per "portebla telefonaparato". Kiel ĉiu povis tuj konstati, lia aparato ne estis kunligita per dratoj, do la ondoj ege rapide rekte iris en la aeron kaj supozeble pli rapide atingos la ĉielon (kaj celon) . Pripensu : kiu estas (estis) la plej naiva ?

Arie Bouman

**Ni, eksterlandanoj, partoprenis UFE-karavano**

En Belgio estis tro malmulte da partoprenantoj por organizi komunan vojaĝon al la UK en Tel-Avivo . En flandra esperantista revuo oni proponis aliĝi al la karavano de francaj esperantistoj . Ni povis elekti inter du eblecoj : sen aŭ kun postkongreso, ni elektis la lastan . La tuta vojaĝo estis bone organizita, la hoteloj estis ege komfortaj . Dum la kongres-semajno ni estis tute liberaj, la duan semajnon ni traveturis Israelon, gvidataj de francparolanta Israela ĉiĉeronino. Franca esperantista amiko avertis nin, ke ni renkontos multe da krokodiloj en la karavanoj . Ĉiu povas kompreni, ke la uzo de pontlingvo inter samlingvanoj ne vere necesas. Malgraŭ tio, ni konstatis, ke la partoprenantoj ofte ankaŭ inter si uzis esperanton. Por ni en Belgio (Flandra parto) la gepatra lingvo estas la nederlanda kaj la franca estas nur la dua. Kun ĝojo ni konstatis, ke la UFE-karavanuloj ĉiam uzis esperanton en la kontaktoj kun ni. Ili verŝajne bone komprenas, ke tio estas ege pli facila por ni ol uzi nian duan lingvon. Kelkaj eĉ diris, ke ili kun granda plezuro kaptis la okazon babili kun ni por sin ekzerci en la internacia lingvo . Mia edzino kaj mi kore dankas UFE, ĝiajn membrojn/partoprenintojn kaj gvidanton Jean-Louis Texier, kiu akceptis nin en la grupo. Ni povos konsili al aliaj (ankaŭ ne francaj) esperantistoj aliĝi al tiu-ĉi karavano okaze de venontaj kongresoj .

Marlène kaj Arie Bouman el Gent / Belgio
NDLR : reklamo nepagita !

UK 2000 : ampleksa raporto kun koloraj fotoj aperis en "Esperanto" de septembro. Vi povas peti ĝin de la Centra Oficejo de UEA kontraŭ unu respondkupono .

SAT-KONGRESO . Ĝi okazis ĉi-jare en Moskvo kaj kunigis nur 125 personojn . En 2001 ĝi okazos en Suda Hungario en urbo Nagykanizsa inter la 14a kaj 20a de julio, do ĝuste antaŭ la Universala Kongreso en Zagreb. Senpaga prospekto estas havebla kontraŭ 1 USD pro la sendkostoj. Sama tarifo por 4 plastaj kongresglumarkoj . Mendi (kun "okcidenta" valuto en la koverto) al Tibor Szabadi, pk 66, HU-8801 Nagykanizsa - Hungario .


ZAGREB EN 2001

KEL (Kroata Esperanto-ligo) ricevas oficialan helpon . Ekzemple la "Zagreba Banko" elektis inter 460 projektoj tiun de Kel kaj subvencios projekton por partoprenigo de junaj esperantistoj en la UK . La Ministerio pri scienco helpas por klerigi maljunajn membrojn de Kel pri komputiloj kaj la Kulturministerio ankaŭ apogos finance. Delegacio de la LKK (komitato) estis akceptita de la kulturkonsilanto de la Prezidento de Kroatio en la oficejo de la Prezidento, Sro Stjepan Mesic, kiu estos la Alta Protektanto de la Kongreso . Poŝtmarko estos eldonita okaze de la 86a UK en Zagreb .

La unua aliĝperiodo etendiĝas ĝis la 31a de decembro . La kotizoj estas 120 EUR por individua membro de UEA, 150 por ne-membro, 60 por junulo aŭ kunulo membro de UEA, 90 por junulo/kunulo ne-membro .

SINSEKVAJ KONGRESOJ

La akompananta mapeto klarigos al vi, kiel eblos partopreni tri sinsekvajn kongresojn en 2001 . Post la Sat-kongreso en Suda Hungario (ne malproksime de la lago Balaton) kaj la UEA-Universala Kongreso en Zagreb (certe venos multaj homoj inter Tel-Aviv kaj Fortaleza (Brazilo)) disvolviĝos en la sama regiono la 70a Itala kongreso en Triesto (28 VII- 1 VIII).



Une cure de trois semaines en Espérantie pendant l'été 2001, c'est possible en "enchaînant" le congrès de Sat en Hongrie, le Congrès Universel de Zagreb et le congrès italien de Trieste .

LE JOURNAL DES LECTEURS

L'espéranto : une solution simple pour l'Europe

Comment envisager l'UE avec tant de langues ? Un collègue a tenté une expérience originale...

Il est tout de même surprenant que les médias, dans leur ensemble, évitent d'évoquer le problème d'une langue commune lorsqu'ils traitent de l'Union européenne. Ils se contentent le plus souvent de mettre en lumière la monnaie unique, comme si celle-ci avait quelque chance de soulever un enthousiasme débordant. L'essentiel est pourtant ailleurs. Peut-on envisager sérieusement le fonctionnement en tant soit peu rationnel d'une institution supranationale avec un boulet de 20 ou 30 langues et dont l'usage nécessite des montagnes



de papier pour des traductions souvent approximatives? « Pourquoi pas l'anglais? » diront certains. La réponse ne peut être que négative: la suprématie américaine est suffisamment oppressante pour qu'on n'y ajoute pas un effet multiplicateur. Mais il existe une solution que nous avons eu la chance d'expérimenter

pendant sept ans (de 1982 à 1989) au collègue Jean-Moulin de Villefranche-sur-Saône: c'est la généralisation de l'espéranto. Nous avons pu, avec les moyens du bord, mesurer les avantages de cette langue internationale, incluse à raison de trois heures par semaine dans l'emploi du temps des classes, de la sixième à la

troisième. Les médias, à l'époque, y ont accordé une large place. Nous nous sommes heurtés à un seul obstacle, mais de taille: l'Education nationale (Jospin-Allègre), qui poussa de hauts cris. Raison invoquée: « Onze langues sont déjà enseignées, il est inutile d'en ajouter une douzième! [...] » **Léo Miquel, Lachassagne**

Article paru dans "Marianne" du 31 juillet au 6 août. La "bulle" du personnage de gauche n'est pas en espéranto, peut-être en europanto ! Cette revue titrait dans son édition du 21 au 27 août : faut-il encore se battre contre l'hégémonie de l'anglais? et dans une édition plus récente sur "les ringards" écrivait au sujet des langues (exactitude du texte non garantie) : l'espéranto est bien mal parti. N'est-il pas moderne de parler anglais ?



LETEROJ DE NIAJ LEGANTOJ

Ni savu ZEO-n !

(R. Boré 481, Square Zamenhof 73000 Chambéry)
Fine de Junio sur la Vadomar-insulo Texel (NL) estis inaŭgurita E°-monumento antaŭ nelonge restaŭrita. Komence la komunumo Den Burg, ĉefurbo de la insulo, plene subtenis la iniciaton sed post tre malfavora artikolo en la loka gazeto "De Texelse Courant" retririĝis, argumentante, ke la angla jam fariĝis la tutmonde akceptita internacia lingvo kaj Esperanto... eksmodaĵo. Ni petas vin amase skribi gratulleteron al la Kolegio de Urbestro kaj Skabenoj en Den Burg (adreso : College van Burgermeester en Wethouders - Postbus 200- NL 1790 AE Den Burg -Nederlando, la letero estu en esperanto kun resumo en la franca). Same al la gazeto De Texelse Courant, retadreso tcnieuws@tref.nl por ke ili sciu, ke E° ankoraŭ vivas kaj restas vivanta. La leteroj estu subskribitaj de kiel eble plej multaj esperantistoj.

Eŭropa agado

(G. Pirlot-Steenbakkerstraat 21-8400 Oostende-B)
 Germain Pirlot estas la kunordiganto de la agado ĉe Eŭroparlamentanoj. Li sendis dupaĝan tekston pri "laŭspertaj konsilioj", kiun vi povas peti de SFS. La konsilioj ankaŭ taŭgas por ĉiuspecaj demarŝoj (responsuloj, politikuloj, ktp). GP kunsendis la liston (je la fino de junio) de la 89 Eŭroparlamentanoj, kiuj iugrade subtenas esperanton; Germanio 5, Aŭstrio 2, Belgio 16 el 25, Danio 4, Hispanio 9, Finnlando 2, Francio 13 el 87, Britio 15 Grekio 1, Irlando 12, Italio 6, Kuksemburgio 0 (!), Nederlando 1, Portugalio 1, Svedio 2. Espereble tiu nombro ankoraŭ kreskos por trovi la nivelon de la antaŭa Parlamento.

El (preskaŭ) la antipodo

Gérard Mansel, delegito en Nouméa -Novkaledonio sed loĝanta parton de la jaro en nia regiono - kaj lia edzino Laure amike salutas la legantaron de SFS. Ili esperas en 2001 partopreni la UK de Zagrebo kaj iom restadi en Eŭropo. Por ke ni ne tro bedaŭru la someran veteron, ili sendis karton kun kokospalmofĉestrando. Ni rendevuas ĝis la UK.

Malhelblua ĉielo

Pura travidebla akvo

Varma blanka sablo

Kokospalmo



Konvertiloj


(Mikaelo Simon 219 Rte d'Anduze 30260 Quissac)
 Nia juna amiko ankaŭ interesiĝas kaj spertas pri komputiko; li kreis programon en la franca kaj E° por konverti Frankojn en Eŭrojn kaj inverse. Ĉi-poste la recenzo de lia inventaĵo en la revuo "Freelog". Gratulojn al Mikaelo !

(E°-PTT BP 126 05004 Gap Cedex)

Nia senlaca amiko Roger Colney ĵus eldonis kun sia grupo "juvelon" (laŭ lia priskribo). Ĝi aspektas kiel ŝlosilringo kun franclingva slogano pri Eŭro kiel unika valuto por Eŭropo kaj E° kiel komuna lingvo. La "juvelo" estas ankaŭ konvertilo (de Eŭroj en Frankojn; ni devos baldaŭ adaptiĝi!) kaj entenas ĵetonon, kiu certe utilos por viaj aĉetoj en magazenoj (vi ne plu bezonos kunporti 10 frankan moneron!). Do triobla aŭ kvarobla uzo por la sumo de 15 F (unu ekzemplero, afrankite), 28F (por du) aŭ 50 F (por kvar). Samtempe vi ricevos la liston de la antaŭaj eldonoj (ĉiam originalaj ideoj). Adreso ĉi-supre, por pagi: pĉk Lyon 6052-52 F

Internacia Konvertilo

Auteur : Simon Mikaelo - Version : 1.0 - W9x+ - F
 Ce logiciel en français, mais aussi en espéranto (langage international, l'auteur donne des adresses, si vous désirez l'apprendre !)



permet de convertir les euros en cinq monnaies différentes et vice-versa. Les monnaies dont la conversion est possible sont européennes, mais le dollar répond également présent à l'appel. La conversion n'est pas automatique et nécessite un clic sur un bouton "exécuter", de plus, l'auteur a scindé les changes euros/monnaies monnaies/euros : pas très pratique ! Mais l'interface colorée et les caractéristiques décrites en font un free-ware agréable à utiliser.

Lastminutaj novaĵoj el la ekstremaĵo

Ne temas pri Lozère sed pri Aude (je la limo kun Ariège), kie nia amiko Jorgos nun loĝas (11420 Lafage-Belpech). Lastjare li instruis al grupeto de 2-7 personoj en vilaĝo Lérans. En najbara vilaĝo Limbrassac ankaŭ Monique Garrigues ekinstruis al alia grupeto de 2-5 personoj. Por la nova lernojarotria E-instruemo ekgvidos E-kurson en sama regioneto (Ulmio -Mirfiŝejo) : S-anino Claude Fressonnet, en klubo Leo Lagrange de vilaĝo Lapenne ĉiusabate je la 17a horo al 3 ĝis 6 homoj. "Riveretoj fluas al riveroj".

DIVERSAĴOJ

Bilanco


Ĉiujare dum la turisma sezono "Midi Libre" intervjuas eksterlandajn turistojn kaj demandas iliajn impresojn pri la akcepto, la prezoj, ktp. Kutime la turistoj bedaŭras la fakton, ke la Francoj ne regas aliajn lingvojn. Ĉiujare oni intervjuis Germanojn, ĉar ili estas la plej multnombraj (1,2 miliono kun averaĝo de 7 taga-restado) kompare kun la Britoj (600 000), la Nederlandanoj kaj la Italoj (440 000) la Belgoj, Hispanoj, Svisoj, Aŭstroj, ktp. La intervjuitoj ege ŝatas Francion (tion asertas la gazeto / eldono de la 24a de julio) sed restas problemo pro komunikado (vidu dekstre). Ĉu normale en la jaro 2000a sin esprimi per la manoj kaj piedoj ?

S'ils apprécient beaucoup la France, la plupart des touristes d'outre-Rhin peinent encore à maîtriser la langue de Molière. « *Bonjour, au revoir, merci beaucoup, ça s'arrête là* », avoue modestement Horst Friedrichs. Alors, pour communiquer avec des Français toujours aussi imperméables aux langues étrangères, on s'exprime aussi « *avec les mains et les pieds* » et en général ça se passe plutôt bien.

Malperfektaĵoj

Malgraŭ nia atento eraretoj enŝteliĝas ĉiufoje kaj ni pardonpetas ! Lastfoje mankis unu nigra kvadrato en la krucvorta tabelo kaj la povraj legantoj ŝvitis dufoje, pro la krucvortoj kaj pro la ekstera temperaturo . Diagramo el "Le Courrier de l'Unesco" kun la dek plej gravaj lingvoj estis duonlegebla, ĉar fotokopiado de koloraj dokumentoj ne ĉiam donas bonan rezulton . En milionoj da parolantoj (gepatra kaj dua lingvo) okupas la unuan lokon la angla kaj la ĉina (po 1000 milionoj), la duan lokon okupas la hindia + urdua (900) kaj la trian lokon la hispana (450).

Fine pro tenika problemo (la komputilo ne konsentis aldoni la "ĉapelojn" al iuj literoj kaj tiel, malgraŭ permana korektado, estis forgesitaj kelkaj "ĉapeloj". Pri la radego en Londono, ni menciis, ke ĝi portas 32 celojn . Kompreneble temis pri "ĉeloj" por 25 personoj samtempe .



Manifesto 2000

Unesco kaj UEA intencis sendi 100 milionojn da subskriboj al UNO (Unuiĝintaj Nacioj) sed rikoltis nur la kvaronon de tiu sumo . Pro tio la kampanjo plu daŭras kaj vi povas subskribi (se vi forgesis tion fari) aŭ subskribigi . Vidu la lastan SFS sur paĝo 9a aŭ petu novan ekzempleron de SFS .

Vojaĝemuloj

Multaj el ni jam aŭdis pri la okjara vojaĝo de Ges. Robineau tra la mondo, aŭ legis ilian libron en esperanto aŭ la franca . Aliaj gejunuloj provas malkovri la mondon dank'al esperanto . Gudule Le Pichon kaj Laurent Cuenot foriris en 1997 por kvarjara rondvojaĝo de Eŭropo kun ĉevalino kaj ĉaro (rulhejmo) . Ili estas nun en Hungario kaj estas iom bremsataj . . . pro la tro varma akcepto ĉie .

Pri ilia vojaĝo vi povas konsulti <<http://www.creaweb.fr/a.reto>>

Rachel Prual kaj David Cholet ekiris la 15an de julio el Vendee por dujara vojaĝo ĉirkaŭ la mondo, kun vizitoj al lernejoj en kvardeko da landoj . Post vizito al la UK en Israelo, ili vizitis Jordanion, estas nun en Egiptio, kie troviĝas du aliaj gejunuloj vojaĝemaj Boris kaj Veronika . Pri Rachel und David eblas sekvi ilin ĉe <http://mondepouce.ctw.net>, pri Boris kaj Veronika tdmesperantistoj@egroups.fr .

Pasporta servo

Senpaga akcepto de gejunuloj por daŭro fiksota de vi kaj kondiĉoj ankaŭ fiksotaj de vi .

La eldono 2000 enhavis la rekordan nombron de 1075 adresoj en 76 landoj (bona afero por varbi gejunulojn) . Sed la gastoj devas konfirmi sian pretecon ĉiujare kaj iuj ankoraŭ ne reagis por la venonta eldono . Limdato por la eldono 2001 estas la fino de oktobro, do restas kelkaj tagoj, se vi volas aldoni vian nomon al la listo .

Hejmpaĝoj : <http://www.esperanto.nu/ps> ; <http://esperanto.net/ps>

Retadresoj : pasporta.servo@esperanto.nu ; pasporta-servo@esperanto.org ; pasporta.servo@wxs.ni



Aŭ Pasporta Servo ĉe Derk Ederveen; Westenburgstraat 15 - NL-2275 XR Voorburg

Landa organizanto : Jorgos 11420 Lafage 04 68 60 54 17

Anticipan dankon pro via helpo al gejunuloj !



KRUCVORTOJ



Solvoj de la 153a

I	H	E	L	I	K	O	P	T	E	R
II	E	P	A	N	O	R	T	O	Z	O
III	L	I	B	E	R	T	I	N	E	C
IV	I	G	I		B	O	A		K	E
V	O	L		L		G	L	U	I	L
VI	P	O	L	I	K	R	A	T	E	
VII	O		A	Z	A	Z	E	L	O	
VIII	L	I	M	R	E	F		R		T
IX	O	T	I	D		I	D		M	I
X	J	O	D	O	F	O	R	M	I	T
	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10

HORIZONTALE

- I) Aŭtuna frukt(o) .
- II) L(i) ne ŝatas porinfanan Biblion .
- III) Duonmola / Vekil(o) .
- IV) Fil(o) de Venera / Komik(o) de... situacio .
- V) Duontag(o) / Rolul(o) de Tinĉjo .
- VI) Kastrit(o) / Ludtabl(o) .
- VII) s : Eŭropano / s : Giganto / Faka naz(o) .
- VIII) Frapinstrumento / s : Puriga pulvoro .
- IX) Eŭropan(o) / s : Enuo .
- X) s : Helico / Zorg(o) .

VERTIKALE

- 1) Insektord(o) .
- 2) Nudtemplul(o) .
- 3) Prepozicio / Prefikso / s : Aparato .
- 4) Ni aŭ multaj / s : Japana muzikilo .
- 5) Marŝirmil(o), interalie / Duonov(o) .
- 6) Politika aŭ pragmatisma doktrin(o) .
- 7) Malsprita paciencul(o) / Fizika unuo .
- 8) Ludkart(oj) / El Napolo .
- 9) Fulmoforigilvendisto... .
- 10) s : Odiseada vento / s : Nodoplenu .

s : sone

BOPARO.

ANEKDOTOJ

Interparolas geedzoj . La iom revema edzino diras :
 -Pli frue, vi estis multe pli afabla, pli dolĉa kaj pli romantika . Ekzemple vi parolis al mi tenere, vi karesis mian mentonon...
 -Jes, intervenas la edzo, sed tiam vi havis nur unu mentonon .

-Mia bopatrino dietas nun; ŝi manĝas nur bananojn kaj kokosojn.
 -Ĉu ŝi maldikiĝis ?
 -Ne, ŝi ne maldikiĝis, sed vi vidus kiel facile ŝi grimpas sur la arbojn !

Viro iras al ĉina restoracio kun sia kunulino. Por impresi ŝin, li pretendas, ke li komprenas la menuon, skribitan en la ĉina lingvo . Al la kelnero, li montras plurajn manĝaĵojn :
 -Mi deziras tion ! -Jes, Sinjoro !
 -kaj ankaŭ tion... -Jes, Sinjoro !
 -kaj fine tion . -Tio ne eblas Sinjoro .
 -Kial do ? Ĉu ne plu restas ? -Ne, tio estas la nomo de la estro !

*La venonta SFS aperos...
 venontan jaron, komence de januaro . Sendu viajn kontribuojn ĝis la fino de decembro al :
 Jean Hénin -Rte de Montcayroux
 48500 La Canourgue (0466328636)
 <Jean.Henin@wanadoo.fr>*

